

ESPERANTISTA

REVUO POR ESPERANTO EN ĈEĤOSLOVAKIO

Eldonas Esperanto-Asocio en ĈSR, Praha XIX, Uralské nám. 9. — Redaktas dr. Stan. Kamarýt.

L. L. Zamenhof:

VEČ DOUFÁME

(Esperantská hymna)

*Nový duch se rodí po vši zemi,
světem mocné volání se nese;
uchváčeno vánku perutěmi,
nechať po všech krajích rozlétne se!*

*Nechce meč, jenž po krvi by bažil,
lidskému snad v ruku vtisknout rodu;
světu, který tolik válek zažil,
dokonalou přislíbujе shodu.*

*Pod praporem, na němž hvězda září,
průkopníci miru stojí v šiku,
dílo záslužné se rychle daří
sboru doufajících bojovníků.*

*Věky snažily se roztrhnouti
rozvaděné národy a kmeny,
hradby mezi nimi však se zhroutí,
vrouci láskou jsouce rozbořeny.*

*Jedna mluva všechen rozpor ztlumi,
celičkému lidstvu sloužic k duhu,
neboť druh až druhu porozumí,
přilne věrně k rodinnému kruhu.*

*Proto, drazí bratři, bez ustání
v mírové své práci pokračujme:
věčné vzejde světu požehnání,
až se naše snaha plně ujme!*

Přeložil Miloš Lukáš.

Naše theorie

Jakým způsobem docíliti, aby se začalo mezinárodního jazyka používati v širším nebo v obecném rozsahu, o tom mohou býti jen domněnky. Výsledek rozhodne o jejich správnosti.

My esperantisté se domníváme, že jediné úspěšnou je cesta námi navrhovaná. Předkládáme jazyk, vytvořený podle intuitivně předjatých směrnic Zamenhofových bezejmenným kolektivem jeho stoupenců. Je to umělý jazyk a posteriori neboli naturalistický, jak si oblíbili, ne zvláště případně, říkati někteří interlingvisté. To znamená, že jeho slovní poklad je vytvořen na základě nejrozšířenějších jazyků evropsko-americké kultury, to jest francouzštiny, angličtiny a němčiny. Tento různorodý element je pak spojen v harmonický celek pravidly apriorními, schematickými (toto slovo nové interlingvistiky

je velmi případné). Slova, která se z jmenovaných jazyků nedají vybrati, protože se v nich buď nejasně vyslovují, nebo mají mnoho významů, nebo jejich smysl velmi kolísá podle slov, s nimiž jsou spojována v ustálená rčení často idiomatická, byla vytvořena apriorně. Jsou to hlavně korelativní částice, které jsou vytvořeny zcela schematicky, usnadňují mnemotechnicky pamatování a umožňují jemné diferencování významových odstínů, pro něž těžko se najde obdoba v některém i velmi rozvitém jazyku přirozeném. Ale i řada jiných slov.

Na tomto podkladu se esperanto vyvinulo a zkušenost (ne úvaha ani theorie) ukázala, že je to jazyk schopný vyjádřiti nejjemnější odstíny myšlenky aspoň tak přesně, jako na př. angličtina, ruština nebo francouzština.

A my esperantisté věříme, že tento jazyk se rozšíří pohenáhlým užíváním těch, již ho chtějí užívat z důvodů idealistických nebo praktických. Veřejnoprávní uznání dostaví se samočinně až bude esperanto už značně rozšířeno. Nevěříme, že veřejná moc bude hráti důležitou roli pro rozšíření pomocného mezinárodního jazyka. Veřejná moc vezme jeho existenci na vědomí a vřadí ho do veřejných škol až potřeba jeho znalosti bude evidentní.

Někteří stoupenci pomocného jazyka pokládají šíření esperanta za příliš pomalé a příčinu vidí v jeho nedokonalosti. Domnívají se, že lepší umělý jazyk bude se šířit rychleji. V současné době hlásají u nás tuto myšlenku occidentalisté. Za přednost occidentalů vydávají, že má abeceda bez diakritických znamének a že naturalismus jeho slovníku i gramatiky je naprostý. Obojí lze vyvrátit. Abeceda bez diakritických značek není zase fonetická, což odporuje jiné obecně postulované vlastnosti umělého jazyka, naprostá aposteriornost je výplod abstrakce, stejně jako naše tabulka korelativních slovců. Kritika původních esperantských kmenů s hlediska jejich mezinárodnosti byla provedena už za sporů o reformy idistické. Ukázalo se, že z 2640 kmenů *Universala vortaro* (pátého vydání z r. 1906) jen padesát je z tohoto hlediska sporných; mezi spornými je na př. slovo *gurd* o, kolovrátek. Slova později přijímaná a ověřená v *oficialaj aldonoj* jsou po stránce mezinárodnosti ve svém celku ještě lepší, neboť skutečně byla vybírána z literatury esperantské, která má jistě mnoho chyb, ale nedostatek mezinárodnosti jí určitě nelze vytýkat. U occidentalů taková revize dosud ovšem provedena nebyla. Většina jeho kmenů jsou kmény esperantské, nově přijaté jsou po mnohé stránce sporné, neboť samotný výskyt kmenu v románských nebo anglosaských jazycích, nebo jako »cizí« slovo v němčině a v jazycích slovanských, neznamená mezinárodnost vhodnou pro mezinárodní jazyk, kde se jedná též o značný stupeň jednoznačnosti slov, vyhýbání se synonymům a homonymům. Na př. slovo *mikro* nemůže být vzato ve významu malý a slovo *mega* ve významu velký, protože mezinárodně znamenají miliontina a milion v terminologii jednotek měrných. Nesklonnost přídavných jmen, na niž si *occidental* zvláště zakládá, není zlepšení nesporné, neboť neoznačení kmenu adjektivním znakem (v esperantu příponou -a) znesnadňuje jejich poznávání.

Jiní stoupenci umělého pomocného jazyka myslí, že nejlepší cesta k jeho zavedení je nařízení vlád nebo nějaké obecně uznávané korporace. Takové uznání chce organizovat *International Auxiliary Language Association*, založená r. 1924 v New Yorku (420 Lexington Avenue) a pokládá k tomu za potřebné prozkoumat dosavadní umělé jazyky a sestrojiti nebo dáti sestrojiti od pomyslých znalců nejdokonalejší umělý jazyk, který bude pak přijat od směrodatných autorit. Hlavní iniciátorka IALA je paní Alice V. Moris. Když byl její manžel americkým vyslancem v Belgii, posílala prospekty tohoto

volného sdružení v obálkách amerického vyslance. My, již organizujeme esperantské hnutí, vždy odmítáme takovéto předstírání. Nikdy netajíme, že těm, kteří chtějí jít s námi, nemůžeme nabídnouti nic, než svůj rozum a své pracovní nadšení, víru, že pracují na věci možné a na věci dobré. Dosud IALA nevykonala nic, než že theorie a výzkumy, vypracované esperantisty, seřaduje a mluví o nich jako o věcech nových, ač je to vše staré aspoň dvacet až třicet let. Hlavní, čím se liší od theorie esperantistů, je tvrzení, že mezinárodní jazyk bude zaveden nějakým rozhodnutím obecně uznávané autority. Nikde se nevyjádřili jaké. Bude-li to organizace veřejnoprávní, na př. rada zahraničních ministrů, nebo organizace s velkou mravní vahou, na př. Světový svaz akademií?

Odmítáme domněnku occidentalistů i domněnku IALA.

Prvou proto, že o obecném zavedení mezinárodního jazyka nerozhodnou podrobností mluvnické a slovníku. I kdyby to byl jazyk podstatně lepší než esperanto (*occidental* lepší není, jmenovitě co se týká snadnosti naučení a přesnosti výrazové), sotva by mohl zaujmouti postavení esperanta nebo vytvořiti obdobnou organizaci pro předběžnou aplikaci mezinárodního jazyka, jak ji má esperanto. Neboť esperanto zapustilo kořeny a kořinky tak mezinárodně, proniklo mezinárodním usilováním o různé reformy, počínaje vnikáním komunismu do závětří idealistických reformátorů a konče snahami o jazykovou normalisaci, o reformu výživy, vegetariánstvím a abstinencí. Ať chceme nebo nechceme, vždy budou esperantisté, neboť esperantu se lze skutečně snadno naučit a snadno jeho znalost zužitkovat.

Domněnku IALA odmítáme ze zkušenosti, neboť celá naše práce o skutečné proniknutí esperanta je vedena empirií a stále empirií kontrolována. Podařilo se na začátku Společnosti národů získati pro esperanto jednoho ze tří generálních podsekretářů (dr. Nitobé, vynikajícího Japonce) a Společnost národů provedla šetření o stavu otázky mezinárodního jazyka. Zpráva o něm je pozoruhodné dílo, nejčastěji tištěné z publikací Společnosti. Byla předložena Komisi pro mezinárodní spolupráci. Tam akce skončila. Mocní a slavní tohoto světa neriskují pokus s věcí novou. Ta se musí prosadit sama vlastní silou, veřejná moc jen potvrdí *fait accompli*. A že by někdo spoléhal na Světový svaz akademií!

Proto setrváváme při své metodě, již potvrdila zkušenost a jež dosud jediná přinesla myšlence mezinárodního jazyka možnost realizace, a to, pokud se týče mezinárodnosti, realizace už úplně. A nadto! Ani nacistická stupidnost a krutost nedovedly vyhladiti esperanto ani v Německu.

Proto zveme všechny přátele myšlenky mezinárodního jazyka upřímně a u vědomí své odpovědnosti, jež plyne z práce už vykonané a z výsledků už dosažených, i přátelsky: Poďte s námi!
Dr. Stanislav Kamarýt.

Kion rememorigas al ĉeĥoj la jaro 1948 (Kelkaj jubileoj el nia historio.)

Dum la jaro 1948 estas pluraj datrevenoj, gravaj, iuj ĝojigaj, aliaj malgajaj por niaj nacio kaj ŝtato. Ni citas ilin ĉi tie laŭ la tempa sinsekvo, ne laŭ la graveco.

Antaŭ 750 jaroj, en 1198, fariĝis Přemysl I-a hereda ĉeĥa reĝo, la 26-an de aŭgusto pasos 670 jaroj de post morto de Přemysl Otakar II-a, kiu falis sur Moravia kampo apud Vieno en 1278.

Antaŭ 600 jaroj, en 1348, estis fondita de Karolo IV-a la universitato en Praha, la unua universitato centroeŭropa.

Antaŭ 490 jaroj suriris la ĉeĥan tronon Jiří de Poděbrady, nacia reĝo, partiano de Husanoj.

La 23-an de majo estos la 330-jara datreveno de la fama „elfenestrigo“, per kiu komenciĝis la Tridekjara milito. Estis tiam elĵetitaj el la fenestroj de la reĝa kastelo en Praha du landestroj.

La Tridekjara milito, per kiu tiom suferis la ĉeĥaj landoj, finiĝis antaŭ 300 jaroj per la packonkludo en Münster kaj Osnabrück.

Antaŭ 130 jaroj, en la jaro 1818, estis fondita Ĉeĥa muzeo en Praha.

La jaro 1848 alportas al ni, same kiel al multaj aliaj landoj eŭropaj, plurajn jubileojn de speciala graveco.

Tiam, antaŭ 100 jaroj, la 25-an de aprilo, aperis aŭstria konstitucio, kiu neis la memstarecon de Ĉeĥa reĝlando.

La revolucion en Praha likvidis aŭstra generalo Windischgrätz. Li okupis la 12-an de junio 1848 la urbon Praha kaj dissolvis la Slavan kongreson, kiu manifestis per rajtoj de slavaj nacioj.

La 7-an de septembro 1848 ĉesigis la parlamento en Vieno la servutecon ankaŭ en ĉeĥaj landoj.

Grave influis nian historion la jaro 1918.

La 6-an de januaro postulis la deklaro de ĉeĥaj deputitoj en aŭstria parlamento la decidrajton por ĉeĥa nacio.

La 23-an de majo komencis agi en Rusujo memstara armeo ĉeĥoslovaka.

La 26-an de junio estis rekonita la Ĉeĥoslovaka Nacia Konsilantaro en Parizo sendependa registaro.

La 21-an de septembro havis gravajn militajn sukcesojn la ĉeĥoslovakaj legioj en Italio.

La 18-an de oktobro proklamis T. G. Masaryk en Washington la ĉeĥoslovakon sendependecon.

La 28-an de oktobro 1918 estis fondita la Ĉeĥoslovaka respubliko.

La 14-an de novembro deklaris la Ĉeĥoslovaka parlamento la Habsburgan dinastion sentronigita kaj Ĉeĥoslovakio estis proklamita sendependa respubliko. Ĝia unua prezidento estis elektita T. G. Masaryk, kiu la 21-an de decembro revenis al Praha.

Malĝojajn okazintaĵojn rememorigas al ni la jaro 1938. Tiam, antaŭ 10 jaroj, estis laŭ interkonsento de la Grandpotencoj en München okupita de la germanoj parto de nia lando. Ekmarŝis la Nigraj Fortoj, komenciĝis niaj sesjaraj suferoj kaj la Dua Mondmilito.

Laŭ div. fontoj O. G.

Por la kompilinto signifas la jaro 1948 la 40-an datrevenon de lia esperantistiĝo, sed li konsentas, ke tiu okazintaĵo de la jaro 1908 ne havis iajn sekvojn cetere.

Letero de Fr. V. Lorenz al ni

(Vilaĝo) Dom Feliciano (eks-São Feliciano), ŝtato Rio Grande do Sul, Brazilo, la 5-an de oktobro 1947.

Tre estimata samideano kaj samgentano!

Elkorajn salutojn.

Antaŭhierau mi ricevis ekzempleron de la sesa numero de l'kuranta jaro de la revuo »Esperantista«, de Vi redaktata, kiun sendis al mi mia amiko s-ro Ant. G. M. Habich. En ĝi mi legis artikolon »Fr. V. Lorenz daŭre aktiva«, skribitan de Dr. T. Pumpr. Mi dankas lian ĝentilecon kaj volas priklariĝi kelkajn topikojn.

Se mi ankoraŭ vivos je la 24-a de decembro de ĉi tiu jaro, mi estos tiam 75jara. La lernolibron de Esperanto por bohemoj mi verkis en 1890, dum mia 18a jaro, kiam mi forlasis la gimnaziajn studojn, pro malsano, kaj iĝis ĵurnalisto. Jam antaŭe, antaŭ la apero de Esperanto, mi ellernis Volapükon kaj korespondis kun ĝia aŭtoro.

Mia vivo, dum mia junaĝo, estis plena de suferoj. Dum la tri jaroj, kiujn mi pasigis en Praha, skribante por socialismaj gazetoj kaj gajnante miajn vivrimedojn pere de privataj instruoj, ofte mi devis fasti. Kiam mi fuĝis, pro politikaj persekutoj, Brazilon, ĉi tie estis revolucio, kaj mi estis devigata labori en orminoj (kie mi forlasis la lastan monon), poste ĉe masonistoj, poste kiel ŝipa ŝarĝoportisto, eĉ en sekviandejo (kiel viandsekisto, mi, kiu preferadis manĝojn senviandajn), kaj kiel taglaboristo ĉe terposedantoj; poste mi estis privata instruisto, terkulturisto, poŝtagento. En la jaro 1899a (kiam mi jam estis edziĝinta) la sorto ridetis al mi: mi ricevis

en Porto Alegre, la ĉefurbo de la ŝtato Rio Grande do Sul, la postenon de kontrolisto de enmigrado kaj tradukisto; mi tiam donis pruvon de mia posedo de 12 lingvoj. Sed, post ses monatoj mi devis forlasi tiun bonan postenon, ĉar la ftizo minacis ekposedi mian korpon kaj la kuracistoj konsilis al mi transloĝiĝi kamparon; tial mi revenis la kolonion São Feliciano (nun nomatan Dom Feliciano) kaj ĉi tie mi jam restis. En 1903a mi estis nomita ŝtata instruisto, pli poste lernejestro; je 1943a mi emeritiĝis.

Dum kelkaj jaroj mi simpatiis kun la projektoj de plibonigo de Esperanto, sed miaj cirkonstancoj, la ĉiama manko de mono, ne permesis al mi grandajn farojn; de »Astro Idista« aperis nur unu numero. Ke mi kunlaboris iom kun R. Saussure kaj aliaj reformistoj, estis motivite de la falsaj informoj pri »fatala dekadenco« de Esperanto, kiujn mi ricevadis. Sed kiam mi konvinkiĝis pri ilia falseco, dank' al s-ro Ismael Gomes Braga, mi dediĉis min denove al Esperanto; miaj provoj kaj eksperimentoj pruvis al mi, ke vere ne povas esti konstruita lingvo internacia pli simpla, pli logika kaj pli facila, ol tiu de Zamenhof. — Dr. T. Pumpr deziras (en la citita artikolo) scii: el kiuj de la 40 lingvoj mi tradukis la poeziaĵojn senpere kaj el kiuj nur pere de alilingva interpreto. Mia respondo estas: Neniu helpis min tiam; nur en iuj kazoj, la gramatikoj kaj vortaroj, kaj en iuj alilingva traduko. Mi tradukis jam ĉirkaŭ 200 novajn poemojn kaj poemetojn el 44 lingvoj, sed mi ne scias kiam ili aperos en libroformo, ĉar mia eldoninto estas malsana.

Mi sendas al Vi, estimata samideano, en apar-

ta poŝtpaketo kvar numerojn de revuoj, enhav-
antaj miajn novajn poeziaĵojn kaj ankaŭ aliajn
tiaspecajn presajojn kaj ekzempleron de mia tra-
duko de Bhagavad-Gitā el la sanskrita originalo.
Pri tiu-ĉi mi rimarkas, ke la (senrimaj) versoj
estas formitaj, kiel en la originalo, laŭ
jena regulo: La rakontaj versoj havas po 16 si-
laboj, kun cezuro post la oka silabo; la ritmo
estas tre libera, plejparte trokea. La versoj liri-
kaj havas po 11 silaboj.

Atendante Viajn sciigojn mi estas

Via samideano

Fr. V. Lorenz.

Ni tre ĝojas pro tiuj ĉi edificantaj informoj de
nia samgentano. Li estas versimile la plej mal-
nova esperantisto en la mondo. Li akceptu niajn
salutojn kaj manpremojn sincerajn! Li, homo tra-
pasinta vivon nekutiman. (Red.)

KRONIKO ENLANDA

Teodor Ĉejka sepdekjara. La aŭtoro kaj el-
doninto de la unuaj lernolibroj kaj redaktoro kaj
eldonanto de la unua ĉeĥa gazeto estu salutata
gaje kaj danke kaj laŭte. Temas pri viro, kies
meritoj estas nepre ekster serio. Li naskiĝis la
10-an de januaro 1878 en Bystřice p. H. kaj tie
li ankaŭ estis instruisto dum multaj jaroj. En
1900 li verkis kaj eldonis je propra risiko deta-
lan lernolibron kun ambaŭ vortaretoj (188 pĝ.).
Tiu libro fariĝis unua lernilo, el kiu lernis la
lingvon unuaj pioniroj inter ĉeĥoj. Ĉejka vidigis
talenton verkistan same kiel eldonistan. En no-
vembro 1902 li komencis eldonadi pure esperant-
lingvan gazeton *Revuo internacia*. Ĝi
estis la 13-a inter tiamaj E-gazetoj. Ĉefa ĝia
kunlaboranto estis ruso Seleznev, esperantisto,
kiu tiam vojaĝis tra la mondo kaj verkis prozon
kaj versojn esperantlingvaj. La eksterajo de la
revuo estis brila, la enhavo tre eminenta, preci-
pe komparante ĝin kun tiama nia gazetaro. La
lingvaĵo de la artikoloj estis ĉiam tre zorge kon-
trolata kaj klopodis al evoluo de tiama stato de
la lingvo. La temoj estis tre aktualaj. Ni reme-
moru tie ĉi tradukon el Gorkij por ekzemplo.
Kun la Revuo aperadis kiel aldonoj aparte abon-
eblaj propagandaj gazetoj *Bohema espe-
rantisto* kaj *Germana esperantisto*.
Meritas esti dirite tie ĉi, ke la akcepto de Re-
vuo internacia de la cetera tiama gazetaro, pre-
cipe de tiam gvidanta gazeto franca »L'Espe-
rantiste«, ne estis afabla. Malfacile estas diri
la kaŭzojn. Eble tro da konservativismo, eble
nekutime alta nivelo de la nova revuo. Aperis
de ĝi 5 numeroj. Ankaŭ de la Germana espe-
rantisto aperis la sama nombro. Bohema espe-
rantisto aperadis dum unu jaro kaj sekvaj 9 mo-
natoj. Ĝi kreis modelon por naciaj propagandaj
gazetoj. La lernolibron eldonis Ĉejka en pluraj
eldonoj. Precipe eminentas la Malgranda lerno-
libro 32-paĝa, tre bele aranĝita tipografie, ven-
data po 20 heleroj. Alia grava propaganda el-
donajo estis »E. sur unu folio« kun kompleta

KAROLO PIĈ: SIA EKSKURSO

*Jen vagonaro kuras...
Ĝi jen forveturas,
fumante nigrobrune...
(Kion ĝi portas kune?)*

*Ĝi monden torrapidas...
Ene knabino sidas;
ŝi dikan libron legas...
kaj peze malgajegas...*

*(La vivo ŝin ignoras:
ŝi arde do ekploras;
kaj ŝi sin post la libro
kaŝas kun trema vibro)*

*Ĉar ŝi ĝis nun ne konas
ke ĉio, kio bonas,
naskiĝas el mallumoj
de ĝuste tiaj nunoj!*

gramatiko kaj argumentado sur unu paĝo kaj
Fundamenta vortaro sur la dua, vendata po 2
heleroj. Fina eldono de lia detala lernolibro
aperis en 1908. La saman jaron aperis ankaŭ lia
detala Esperanto-ĉeĥa vortaro (170 paĝoj). Me-
ritas akcenton, ke Ĉejka sciis ankaŭ serĉi kaj
trovi kunlaborantojn eminentajn. Precipe Josef
Krumpholtz estu tie ĉi nomita. En jaro 1910 ko-
mencis Ĉejka kiel kasisto kaj redaktoro de In-
ternacia Asocio de Instruistoj eldonadi Interna-
cian Pedagogian Revuon, kvaronjaran, kies ape-
ris 3 numeroj. Ĝi ĉesis pro nesufiĉo de abonan-
toj kaj de kunlaborantoj same. Sed ĝi signifis
unuan paŝon sur tiu ĉi kampo kaj ĝia nivelo
estis tre respektinda. En jaro 1907 partoprenis
Ĉejka en la Kongreso en Cambridge.

Dum la sekvaj jaroj ĉesis aktiveco de Ĉejka
en la movado. Li dediĉis sin al aliaj utilaj labo-
roj, precipe por urbo, kie li naskiĝis kaj laboris.
Li faris multajn utilajn verkojn, precipe en ko-
operativa movado; por ekzemplo ni citu de li
redaktitan kalendaron de la ŝparkaso de lia
urbo. Sed al Esperanto kaj al nia movado li
restis ĉiam fidela. Li estas aktiva esperantisto
ĝis nun, kaj nia honora membro. Ni rememoru
sole liajn vizitojn ĉe esperantistoj en Praha en
aŭgusto 1947. Oni vidis lin sana kaj plena de
fido je estonteco. Ĝi estas la plej edificanta mo-
mento. Ĉejka, nia Ĉejka, ne estas maljuna!

(Kamarýt)

**Disaŭdigo de la unua Arto-programo en Espe-
ranto el Praha** la 5-an de januaro je la 23,00 ĝis
23,30 horo meritas apartan enskribon. La pro-
gramo ligis sin al programoj de la glora Verda
stacio el Brno. Estis prezentita radio-sceno, per
kiu siatempe Brno komencis, prezentis sin ko-
nataj aktoroj el Brno Höger, Leraus, Švabíková,
Klimeš, Klimešová, Kožík kaj la novaj helpantoj
el Praha Slanina, Zvědelíková, Nývlt, Mařík.
Kortuŝa estis rememorigo pri Inĝ. Slavík, mur-
dita de germanoj. Kunmetis la programon To-
máš Pumpr kaj Dalibor Chalupa, reĝisoris Dal.

Chalupa. La prezento mem estis eminenta. Ni laŭdu precipe la voĉon deklamintan esperantistan himnon kaj ni diru, ke voĉo de s-ino Švabíková estas ankoraŭ pli simpatia ol antaŭ la milito, kaj kanto de Zvědělíková impresa kaj kortuŝa. La artoprogramo estas disaŭdigata ĉiun unuan lundon de monato. La sekvonta estos la duan de februaro je la 23,00—23,30 horo.

Direkcio por vojaĝtrafiko en Slovakio ĉe Komisiono por industrio kaj komerco en Bratislava (str. Kúpeľná 6/B) per sia dekreto nro 05466/47 On/Dr atentigis ĉiujn lokajn grupojn de Slovakotour kaj ĝian inform-oficejon en Praha pri nova ebleco propagandi naturbelaĵojn kaj vidindaĵojn de sia regiono. En Esperanto-traduko la dekreto tekstas: »Redakcio de esperanta gazeto »Esperantisto slovaka« atentigis nin pri avantaĝoj, kiujn donas internacia lingvo Esperanto pere de ĝia gazeto. La gazeto aperas en Trenčín kaj estas ekspedata ankaŭ fremdlandon. — Ni postulas vin, ke vi ekkontaktu kun la nomita redakcio kaj sendu al ĝi aktualajn artikolojn kaj informojn pri via regiono al la adreso: Redakcio de »Esperantisto slovaka« en Trenčín, Kukučínova 1524. — La redakcio havas eblecon prizorgi por vi preson de kovertoj kun kolora klišo laŭ via elekto ĉe unuopaj numeroj de la gazeto por pago de 2.500 Kčs ĉe unu numero plus klišo. — La grupoj, kiuj interesiĝas pri tiuspeca propagando, turnu sin senpere al la redakcio de »Esperantisto slovaka«. — Dujara plano sukcesu! — J. V. Podolay, direktoro.« Ni gratulas la slovakon komisiiton por industrio kaj komerco pro lia bona kompreno de la aferoj.

Raporto de peranto el la 18-a regiono. En julio ni kunvokis por refondo de Esperanta Klubo en Bohumín kunvenon, kie mi parolis pri Esperanto kaj ĝiaj celoj. — Al Kongreso de slovakaj esperantistoj en Turčiansky Svätý Martin Esperanto-Klubo aranĝis ekskurson, kiun partoprenis 32 esperantistoj el Ostrava. — Mi estis nomita ĉe krajský soud en Ostrava kiel interpretisto de Esperanto kaj certe estus tre rekomendinde, ke ankaŭ aliaj samideanoj zorgu pri tio, ke estu ĉe iliaj juĝejoj nomitaj interpretistoj de Esperanto. — Mi partoprenis 32-an Universalan Esperantan Kongreson en Bern kiel sola reprezentanto el regiono Ostrava. Post mia reveno aperis en loka gazetaro multaj raportoj pri tiu ĉi kongreso kaj pri la vivo en Svislando. Merite de s-ano Zdeněk Raška aperis en gazeto Československá demokracie multaj bildoj el kongreso kaj Svislando. En radiostacio Ostrava mi aranĝis ĉeĥian interparolon kun redaktoro de radiostacio Mor. Ostrava Josef Štěpánek pri Universala Kongreso de Esperanto kaj kiel ni konsideras Esperanto-Klubo en Ostrava aranĝis prelegon de gesinjoroj Baur el Svislando. — La 5-an de oktobro 1947 estis en Nový Bohumín denove reinaŭgurita en urba parko esperanta memorŝtono, kiu estis starigita en la jaro 1934 de Regiona Esperanto-Ligo. — En Nový Bohumín estis refondita Esperanto-Klubo, kiu jam komencis sian agadon. S-ano Josef Hanzelka fondis Esperantan



Klubon en Kučičky ĉe Ostrava. S-ano Karel Janouš havis prelegon pri Esperanto en Frýdek. Nun estas tie kurso de Esperanto kaj ankaŭ tie oni intencas fondi Esperantistan Klubon. — Nun mi aranĝas kursojn de Esperanto en Ostrava ĉe Masarykova Vyšší škola lidová, por dungitoj de lokaj fervojoj (tramistoj), en Ostrava-Prívov por fervojistoj de ŝtataj fervojoj. En Bohumín mi gvidas E-kurson, kiun aranĝis Laborista Akademio kun E. Klubo. Post kelkaj tagoj mi malfermos novan kurson de E. en Vítkovice. Krom tio mi instruas kelkajn homojn E. private. En Ostrava-Stará Bělá gvidas kurson de E. s-anino Ludmila Klegová. Ankaŭ de aliaj samideanoj estas en Ostrava kaj ĉirkaŭaĵo gvidataj kursoj de E. Esperanto Klubo en Ostrava ŝanĝis sian sidejon kaj ĝi aranĝas siajn kunvenojn ĉiumerkrede je la 20-a horo en hotelo Imperial. Dum la jaro 1947 mi gajnis 16 membrojn por UEA. Inter miaj kursanoj mi klopodos gajni multajn novajn membrojn por EAĈSR kaj abonantojn por revuo »Esperantista«. (Vlad. Slaný)

Direkcio de ŝtataj fervojoj en Brno invitas per speciala cirkulero el 31-a de decembro numero 811/32—VIII—1947, adresita al ĉiuj siaj fakoj, al E-kurso por progresintoj, kiun gvidas supera konsilisto J. Friedrich depost 9-a de januaro. La cirkulero laŭdas la sukceson de la unua kurso.

Kunveno de la 16-a regiono en Olomouc. »Esperanto-vespero« estis aranĝita la 13-an de decembro 1947 en bele dekoraciita restoracio Těšetická por rememorigi la naskiĝtagon de dro L. L. Zamenhof. En valora programo serioza kaj amuza elstaris instrua prelego de s-anino Havránková el Prostějov pri ŝia dumonata rondveturado tra Nederlando kun kelkaj koncertkomponaĵoj pianaj kaj mallongaj scenoj kaj deklamaĵoj de ĝelernantoj, per kiuj la komencantoj pruvis belan scion de la lingvo. Sukcesplena vespero estis multnombre vizitata de ĝesamideanoj el regiona Olomouca, de regionoj eksteraj kaj de multaj gastoj. Partoprenis pli ol 90 personoj. — Laborkunveno okazis dimanĉon, la 14-an de decembro 1947, en la sama restoracio. Ankaŭ ĉeestis samideanoj kaj gastoj el aliaj regionoj. Entute partoprenis 65 personoj. La kunvenon oni malfermis per esperantista himno, post kiu la prezidanto Vl. Blažek salutis ĉiujn partoprenantojn. Reprezentanto de ŝtatformoj promesis apogon de penoj esperantistaj pri enkonduko de Esperanto en la fervojservon kaj tiamaniere kontribui al propagando de mondfrateco kaj al stabiliĝo de rilatoj inter popoloj. Sekvis salutoj kaj raportoj de perantoj regionaj, distriktaj kaj de reprezentantoj klubaj. Oni konstatis, ke la movado ĉiam progresas, estante favore akcepta-

ta de nia publiko. Esperanto estas jam instruata ĉe kelkaj lernejoj popolaj kaj burĝaj, kvankam regas manko de instruistoj; nombro de kursoj pligrandiĝas, kulturaj kaj amuzaj entreprenoj de esperantistoj estas grandnombre vizitataj kaj vekas ĝojigan intereson pri nia lingvo. Kompreneble ni devas ankoraŭ venki malhelpaĵojn diversspecajn. S-ano Jeřábek (Prostějov) en sia prelego »60 jaroj de Esperanto« esprimis kredon de proksima venko, ĉar malamikoj niaj cedos, vidante sukcesojn. Esperanto estas sufiĉe forta por forigi malkomprenon kaj malamon inter la popoloj kaj tiel malebligi ĉiujn militojn. Dum la kongreso oni aprobis alvokon al ĉs. fervojistoj kaj ankaŭ rezolucion al ministerio de eksterlanda komerco pri enkonduko de Esperanto en la internaciajn komercajn rilatojn laŭ cirkulero de s-ro Richard Levin, Lyon, Francujo. Estis ankaŭ fondita prepara komitato de ĉs. sekcio de la internacia asocio »Esperanto kaj komerco«, gvidata de s-ro Frant. Pytloun en Hradec Králové, Zamenhof-strato 1010. Estis decidite profundigi la propagandon, regule informi la publikon per artikoloj, ĉiam atentigi pri praktika uzo de Esperanto, enkonduki ĝin en ĉiujn lernejojn kaj kunlabori kun Klerigaj Konsilantaroj. Regiona kunveno en Olomouc efike helpis al propagando de Esperanto. (Vl. Blažek)

Unua laborkunsido de Asocio

okazinta en Praha, kafejo Louvre, dimanĉe la 30. XI. 1947, estis tre sukcesa konferenco de la Asocia komitato kun la sekcioj kaj ĉefe kun la regionaj perantoj kaj reprezentantoj de la kluboj. El 16 perantoj ĉeestis persone 12, letere 2. Reprezentitaj estis 14 kluboj. El Slovakio prof. Vlado Jukl, vicprezidanto de SES.

Enkonduke Hromada klarigas, ke la asociaj aferoj tiom plivastiĝis, ke la du ĉefaj funkciuloj ne sukcesis ilin estri. Tial nova aranĝo estis farita depost septembro, en Libroservo jam de julio. Li informas pri la stato de la membraro, kluboj kaj preparoj por utiligo de la sistemo de regionaj perantoj. (Detaloj aperos en la asocia jar-raporto.)

Propagando. Asocio ĝis nun disponigas la konatan flugfolion de Bouška („Pojitko“), belajn diapozitivojn (5 specoj, senpaga prunto) kaj mezgrandajn afiŝojn kun stelo. Preparata estas malgranda varba lernolibreto simila al la iama de ĉeĵka. Bezona estus loĝa varbilo, moderna tipografio kaj enhave. Eldonota tuj, post kiam ni ricevos taŭgan proponon. — Nálevka (Pardubice) proponas renovigi la Gazetaran servon antaŭmilitan, kiu liverus materialon por lokaj propagandistoj. Vítek (Hradec Král.) atentigas, kiamaniere estas eble ricevi monhelpon por loka propagando. (Detalojn ricevos la kluboj.) Jeřábek (Prostějov) rekomendas mendi „Esperantista“ por lokaj publikaj legejoj (faras jam Praha, Hradec Kr., Prostějov). Vítek: Oni starigu grupon da taŭgaj ĉefaj prelegistoj pri E-o kaj esp-aj prelegistoj pri neesp-aj aferoj. Niaj kluboj ŝatus aŭdi bonkvalitajn prelegantojn el diversaj lokoj.

Stacidomaj tabuloj. Asocio havas kvanton. Ginz (Praha): Ĝis nun validas la edikto pri ili eldonita de la ministerio de fervojoj. Pri la nunaj spertoj parolas Nálevka, Echnert kaj Blažek (Olomouc). Vidu la paĝon 12.

Kursoj. Slanina: Se en iu loko aperas malfacilaĵoj por aranĝo de ŬRO-kursoj, informu pri tio tuj Asocion. Vondroušek (Brno) informas detale pri bonaj spertoj kun ŬRO. Mílek (Karlovy Vary) pri malaj spertoj en du lokoj de sia regiono. Pri la temo parolas ankoraŭ Novotný (Liberec), Salmonová (Turnov) kaj Ing. Krajc (Tábor). En iuj lokoj ŬRO postulas, ke la esperantistoj mem faru propagandon kaj portu ĝian kos-

ton. Slanina kaj Krajc donas detalajn klarigojn, pri kiuj ĉiuj kluboj estos informitaj.

Kursojn oni povas kompreneble aranĝi memstare, kaj eĉ ne sole en sia urbo, sed ankaŭ en urboj najbaraj.

Sokol-festaro. Hromada informas, ke la esperanto-flugfolioj pri la XI. Sokol-festaro en Praha 1948, eldonitaj en kvanto 13 mil, estas elĉerpitaj. Nova faldprospekto aperos. En la Sokol-propagando Esperanto montriĝis la plej sukcesa el ĉiuj lingvoj — skribas ĉefaj ĵurnaloj.

Administrato. Malk: La asociaj adresoj Stalino-va 12 kaj tiu de la ĝen. sekretario montriĝis nekonvenaj. Adresu ĉion (ankaŭ Libroservon, UEA) al Praha XIX, Uralské nám. 9. — Dr. Kamaryt: Asocio ne postulas, ke la reg. perantoj pagu la propagandajn kaj administrajn elspezojn el sia poŝo. Male, ili sendu ilian liston de tempo al tempo, ĉiuokaze post la fino de jaro.

Kotizoj. Kubala (Ostrava) deziras, ke la kotizoj estu malpli altaj. Kavan (Plzeň) proponas kategorion de „registritaj membroj“ kun malalta kotizo (ekz. 20 Kčs, sen gazeto, kiun ili prunteprenus en la kluboj). Ing. Krajc (Tábor) kontraŭe konstatas, ke la kotizoj nunaj estas tre moderaĵoj. Hromada klarigas, ke niaj kluboj pagas al Asocio por ĉiu membro 55 Kčs el kiuj 5 Kčs apartenas al UEA. Restas do al la Asocio 50 Kčs, dum la gazeto mem kostas 60 Kčs. Kaj krom tio de junularo ni akceptas sole 40 Kčs. La diferenco kovriĝas per nerabatitaj kotizoj 70 Kčs (t. e. 65 Kčs post depreno al UEA). Pytloun (Hradec Král.): Nia klubo fondis societeton de E-amikoj, neesperantistoj, kun libervola kotizo. Tio ebligis al ni eĉ aĉeti multobligan aparaton. Dr. Kamaryt: Kluboj havigas al si monrimedojn ankaŭ per aranĝado de kursoj. Oni ne faru senpagajn kursojn.

Perantoj. Depost septembro ili estas regule informataj per cirkuleroj. Dr. Kamaryt: Iuj el la perantoj laboras, havas sukcesojn, ne plendas, sed informas nin. Laŭdinda estas ankaŭ la Somera Lernejo en Doksy, laboranta en kontakto kun Asocio, sed faranta mem ĉion, kion ĝi bezonas. Simile la Radio-Komisiono. — Du perantoj rezignis: s-oj Jandík kaj Rebiček. — La perantoj ricevos informojn pri la lokoj de ilia regiono, kie estas esperantistoj, por ke ili sciu, en kiuj pli grandaj lokoj estas necese ekagi. (Daŭrigo.)

NI LEGIS

Deveno kaj vivo de la lingvo Esperanto estas valora studo de Petro Stojan, aperanta sinsekve en la numeroj de Flandra Esperantisto.

Pri la blovmuzikistoj de Praha interesiĝis fakulo el friza Tjerkwerd, kiu ŝatis aŭskulti tiun muzikon, disaŭdigitan el Praha. Loka esperantisto helpis lin skribinte en lingvo internacia al radiostacio de Praha. La intereso ricevis je sia plej granda kontento kompletajn partiturojn kun ĉiuj necesaj indikoj de la ĉeĥoslovaka ministerio de informoj. (Nieuwe Rotterdamsche Courant laŭ Nederlanda Esperantisto.)

Pri Svit, la nova fabrikurbo de Baĉa sub Tatroj, alportas artikolon de dro E. Sahlinger La Juna Vivo en decembro 1947.

Fremdlingvaj gazetoj en Brazilo ne estas permesitaj. La nura escepto estas la gazetoj en Esperanto, kiu do estas la sola lingvo krom la enlanda portugala, en kiu rajtas aperi gazetoj en tiu lando. (La Ponto, nro 3/4 1947.)

Praha en vitro estas titola bildo de Espero Katolika de dec. 1947. Tiu numero alportas kontribuon pri Kristnaska Vigilio, enhavanta la samnoman poemon de K. J. Erben en traduko de Dro Tomáš Pumpr. (G)

Urba biblioteko de Dro Zamenhof. La progresema urbo Alagô Nova en la brazila ŝtato Paraíba aldonis al la nomo de sia biblioteko la nomon de Dro Zamenhof kaj publikigis pri tio flatan dokumenton honorantan la signifon de Zamenhova kreaĵo. (Nova Sento, Uberlandia, aŭg./sept. 1947.) (G)

Al diskuto pri demokrateco en UEA diras Hans Jakob en „Esperanto“ el dec.: Rilate al germanoj, kaj ni estu precizaj — germanaj esperantistoj — nia vidpunkto kaj tiu de amiko Lapenna neniel diferencigas. Ni ne akceptas iun, kiu sin ligis kun naziismo aŭ nazi-faŝismo. Punkto, fino.

Estas planata eldonado de „Esperantologio“, internacia periodaĵo por la lingvistiko kaj la bibliografio de Esperanto. La periodaĵo aperados en kajeroj 48—64paĝaj, formantaj volumojn 250—300paĝajn. Ĉiu volumo estos kompletigata per titolpaĝo, enhavotabelo kaj indekso de aŭtoroj kaj temoj. En la komenca periodo certe ne estos eble eldoni periodaĵon de tiu speco regule — la kajeroj devas aperi laŭ ebloj por havigi akceptindan materialon. Supozeble oni komence bezonos ĉ. 3 jarojn por publikigi unu volumon 250—300paĝan. La abonprezo por tia volumo estas fiksita je 5,00 usonaj dolaroj (250 Kčs) surbaze de ĉ. 400 abonantoj. Por ĉ. trijara periodo tiu abonprezo, normala por volumo de tiuspecaj periodaĵoj, espereble ne montriĝos tro alta.

Enhavo konsistos el traktaĵoj bazitaj sur originalaj esploroj en la kampo de la Esperanta lingvistiko, t. e. pri temoj de fonetiko, leksikologio (vortkunmeto, morfologio, vortenkonduko), etimologio, sintakso, stilistiko, evoluo, kompara lingvistiko (i. a. komparo kun aliaj planlingvoj), lernopsikologio kaj bibliografio. Inter altrudaj taskoj, kies efektiviĝon la planita periodaĵo favorus, estas la pretigo de fakaj Esperantoterminaroj kun difinoj kaj tradukoj kaj de bibliografioj de faka literaturo en Esperanto, inkluzive gazetliteraturon (ekz. de botaniko, kemio, medicino, zoologio). Specialan atenton oni devas doni al problemoj de lingvonormigo, kies aktualeco en multaj fakoj de scienco kaj tekniko konstante akriĝas, kaj kiu tiel havas grandan praktikan signifon por vastaj neesperantistaj rondoj. Krom tiu ĉefa trunko de originalaj laboraĵoj, terminaroj kaj bibliografioj la gazeto devas enhavi: 1. referatojn kaj recenzojn pri publikigaĵoj, kiuj havas rilaton al la celo de la gazeto, 2. notojn (ekz. novaĵojn koncerne al lingvonormigo, Esperanto en universitatoj k. s.), 3. ĉiujn publikajn komunikojn de Esp-a Lingva Akademio.

La originalaj laboraĵoj estos akceptataj en jenaj lingvoj: Esperanta, angla, franca aŭ germana, laŭ la deziro de la aŭtoro. Supozeble la plejparto de la materialo estos redaktata en Esperanto, sed la publikigado de artikoloj ankaŭ en la eŭropaj ĉeflingvoj stimulus la intereson por nia afero inter neesperantistoj kaj i. a. ebligus publikadon de lingvistikaj universitataj tezoj pri Esperanto, verkitaĵoj en la menciitaj lingvoj. La referatoj, recenzoj, notoj estos ĉefe redaktataj en Esperanto.

Al la periodaĵo estas ligata redakcia komitato, kiu partoprenos en la prijuĝado de la proponataj manuskriptoj. Krom la redaktoro prijuĝos manuskripton almenaŭ unu

membro de la redakcia komitato, se eble specialisto pri la temo de la manuskripto.

La preparajn laborojn gvidas Dro Paul Neergaard, Gothersgade 158, Kopenhago K. Estas akceptataj abonpromesoj. Ni tre rekomendas tiun projekton kaj petas la interesatojn peti mendilojn laŭ la donita adreso.

Literatura mondo finis per numero 11/12 sian unuan jarkolekton de la tria periodo. La numero enhavas belan tradukon de E. Belda el la ĉeflingva verko de Ant. Fialka „Trans naŭ montoj“. El la enhavoriĉa kajero ni citu precipe tradukaĵojn de bonhumora poemo de Robert Burns „Tam O'Shanter“, verkita de R. Rosseti, Kolocsay-tradukojn el la hungara poeto mortinta antaŭ dek jaroj Atilla, kaj Stelo-tradukon de rusa burleskaĵo „Sunradietoj“. La unua numero de la dua jarkolekto aperos en februaro. Abonojn akceptas nia libroservo.

Bulteno de Esperantista Klubo en Hradec Králové kun titolo „Esperanto“ aperos en jaro 1948 kvaronjare presita sur tre bela papero, redaktata de J. Vítek. La unua numero 8-paĝa enhavas ĉeflingvajn artikolojn kun esperantlingvaj resumoj. Ni citu el ili precipe Zrcadlo svéta (Spegulo de la mondo) kun raportoj pri la movado el multaj landoj. La bulteno estas sendata senpage al la klubanoj, kaj ĉar inter ili estas multaj amikoj de la movado, ne-esperantistoj, ĝi multe utilos precipe en tiu ĉi grava sfero, kiu meritas prilaboradon, kaj kiu ĝis nun ne estas sufiĉe atentata.

Rosaria Esperanto-Klubo estis fondita en Rosario (Argentino) la 15-an de septembro 1946 kaj festis la 13-an, 16-an kaj 18-an de sept. 1947 unu jaron de sia ekzisto kaj laborado per kunveno, prelego kaj koncerto. Ĝi aperigis por tiu celo hispanlingvan broŝureton kun esperantlingva raporto pri sia laborado. Tre nin ĝojigis tiu ĉi presaĵo, ĉar ĝi dokumentas vivantecon de nia movado en la tuta mondo samtempe.

Bulletin officiel du Centre National Esperanto-office estas trimonata ĵurnalforma franclingva bulteno, kies unua numero aperis en decembro 1947. Redaktas kaj eldonas ĝin Pierre Delaire en Orléans, 2 rue de Vauqui. Ĝi dokumentas viglan esperantistan vivon en Francujo. Ni raportas pri disaŭdiĝoj en ĉeflingva parto de nia revuo.

Laborista voĉo estas multobligita bulteno de la Labor-Esperantista-Federacio (34, str. Chabrol, Paris X), kies unua numero aperis en decembro 1947. La sola artikolo sur la kvar paĝoj informas kiel „Franca laborista klaso luktas“. Pri parto de franca ĵurnalaro diras la aŭtoroj: „Nia putra ĵurnalaro ankaŭ propagandis la malĝustan ideon, ke tiuj strikoj havis „politikan karakteron“, kaj atribuis al la komunistaj partio la rolon de gvidanto! Nu la vera gvidanto de ĉi tiuj gigantaj strikoj estis la Mizeroj, kiu pli kaj pli trafas la laboristajn hejmojn. Estas la ĉiam plipezaj impostoj! Estas la pli kaj pli multe plikostaj vivrimedoj! Dume, la kapitalistoj enpoŝigas skandalajn profitojn. — Sed nia burĝaro estis prava, kiam ĝi ne tro brue montris sian kontenton pri la fino de la strikoj: la laborista klaso ne tute sukcesis, sed de nun ĝi arigas siajn fortojn por morgaŭaj bataloj, ankoraŭ pli maldolĉaj.“

Tutmonda Interŝanĝa adresaro (Břevnov 514 Praha) aperigis en septembro 1947 6-an numeron, kvar paĝoj bele presitaj, 10×16 cm, kun 187 adresoj. Enpresado de adreso kostas 12 Kčs por enlandano, tri respondkuponoj internaciaj por fremdlandano.

Utilan instruon ni legas en la oktobra Svenska Esperanto-Tidningen en artikolo „Giganta laboro“ de Oslo: Ne laboru tiom pri Esperanto, ke vi mem perdu la esperon, sed laboru konstante.

ESPERANTISTA VIVO

Mortis sinjorino Anežka Malíková, edzino de nia prezidanto, la 22-an de decembro 1947 en aĝo de 49 jaroj. Ŝatata samideano akceptu esprimon de nia plej sincera kondolenco.

Mortis la 2-an de januaro 1948 nia membrino fraŭlino Marie Floriánková el Uherské Hradiště. Ŝia familio akceptu sinceran kondolencon.

Edziĝis Karel Pakosta, profesoro en Litoměřice, kun Eva Novotná, instruistino el Brno, la 30. XII. 1947. — Gratulon kaj bondeziron!

RICEVITAJ LIBROJ

Esperantista poŝkalendaro 1948. Hradec Králové ĈSR. Propra eldono de Esperantista Klubo. 88 paĝoj da teksto kaj 64 paĝoj por notoj, 12×8 cm. Bindita tole Kčs 30,—. Ĝi enhavas dataron kun kelkaj rimarkoj el Esperanto-historio (mankas datoj pri fondo de E. Klubo en Brno kaj Praha, kvankam enestas ekz. fondo de Hispana societo), artikoleton pri sesdekjara jubileo de E. Deklaracion pri esperantismo, poŝtan tarifon ĉeĥoslovakon, rubrikojn por adresoj, memorindaj tagoj, elspezoj; anoncaron kaj liston de „Esperantistaj komercistoj“ el Ĉeĥoslovakio (sume 44 nomojn). Tiu ĉi nomaro povas fariĝi komenco de Komerca adresaro, kies kompilo estas tre dezirinda kaj kiu povus en nuna tempo fariĝi tre utila helpilo al praktika uzo de nia lingvo. La samideana klubo en Hradec Králové daŭrigu sian laboron, por kiu ĝi sin proponis, kaj kolektu pluajn entreprenojn el nia lando, en kiuj estas oficisto, povanta esperantlingve korespondi, kaj iniciatu, ke similaj nomaroj estu starigataj ankaŭ en ceteraj landoj. Ilia samtempa eldono en volumeto aŭ en UEA-jarlibro povus signifi gravan faron. — La tipografia arango de la kalendaro estas tre plaĉa.

Daniel Quarello: Breve Historia del Esperanto. Quarello & Cia editores. Buenos Aires. 32 paĝoj 32×16 cm. Prezo S 0,30 argent. — Hispanlingva broŝuro tre trafe pritraktanta nian problemon. La titolpaĝo diras, ke ĝi estis verkita kiel enkonduko de ampleksa verko, eldonota kun titolo „Aprenda el Esperanto!“ Argentinaj samideanoj akceptu nian gratulon.

Daniel Quarello: Lernu Esperanton. Quarello & Cia Eldonistoj, Casilla de Correo 47 (suc. 13). Buenos Aires. 32 paĝoj 32×16 cm. Prezo S 1,— argentina aŭ 5 respond-kuponoj. — Estas ĝuo foliumi tiun ĉi broŝuron. Ĝi estas laŭ la titolpaĝo ekstrakto el la verko „Lernu Esperanton“, libro dediĉita al tiuj, kiuj deziras koni ĝisfunde, paroli korekte kaj skribi perfekte nian lingvon. Tiu ĉi kajero enhavas ĉapitrojn: Predikativo, Akuzativo, Transitivity kaj neactivity verboj, Atributo de l' verbo, Konstruo, Komuna dativo, Aliaj klasoj de dativo, Kazo dativo, Kazo agantivo, Aktiva voĉo kaj pasiva voĉo, Mediala voĉo. Deklinacio. La dua ekstrakto enhavas: La propozicioj, La komplementoj de l' substantivo, La komplementoj de l' verbo, La kunmetitaj propozicioj, La formo rekta kaj formo nereakta. — Kiel ekzemplon ni citu sekvan difinon: „Propozicio estas konglomerado de paroloj, kiu enhavas kompletan penson kun klara kaj sendependa senco. La apartaj funkcioj plenumata de ties vortoj en la propozicio nomiĝas kazoj. La serio de l' kazoj formas la deklinacion, nome la diferencajn poziciojn okupatajn de l' vortoj en propozicio.“ La broŝuro finiĝas per konstato: „Studi tiel la gramatikon, estas studi la penson.“ Jes! Gratulon al la aŭtoro!

A message to the Linguist's Congress. With new Alphabet arrangement. By Felice Rovai. Copyright 1947. 32 belaj litografitaj paĝoj 15×23 cm. — La aŭtoro prezentas al „Kongreso de universala lingvo“ tabelon de literoj, prezentantajn sonojn ĉie facile prononceblajn kaj facile aŭdeblajn. La aŭdebleco estis mezurata je distanco de du cent futoj. La proponata alfabeto enhavas 9 literojn supersignitajn kaj sur 9 vokaloj estas uzataj signoj de longeco. Per tiu alfabeto oni povas skribi ĉiujn lingvojn, ekzemple ankaŭ la grekan, rusan, japanan, kiel dokumentas tekstoj en la broŝuro.

REDAKCE A ADMINISTRACE SDĚLUJE:

Předplatné račte poukázati složenkou č. 9602, příloženou k minulému číslu, pokud možno brzy, abychom mohli včas stanovit náklad časopisu.

Slovníček česko-esperantský: K číslu dnešnímu příloženou dalších 16 stránek. Starí členové mají nárok dostávat slovníkovou přílohu za výhodnou cenu 15 Kčs, zašlou-li tuto částku do konce února. — Noví členové platí za slovníček 20 Kčs. Stránky, vyšlé v loňském ročníku, jim dodáme.

Vydavatelství Svazu: Upozorňujeme na naše sdělení na str. 118, že částek, upsaných na velký slovník, bude z tím použito k vydávání knižních překladů z české literatury. Prosíme, aby upisovatelé, kteří s tím nesouhlasí, sdělili nám to do konce února. Zatím jsme dostali jen jeden nesouhlas a těšíme se, že tedy ostatní jsou ochotní k vydávání esperantských knih přispěti. Mezitím došli další úpisy. Všem děkujeme!

LINGVO

15. úkol k překladu:

Ĉetl jsem jednou v jakési utopistické skladbě o pozemském ráji, kde i všechny plody ducha byly zadarmo, kde za požitek z hudby a z básně a z románu a z divadla a z obrazu a z veškerého jiného umění se vůbec neplatilo, kde i tato blaha patřila k darům, jimiž nás na příklad zahrnuje štědře boží slunce nebo zdravé povětří. I všechno umění přicházelo jaksi z vesmíru, linulo se k očím i uším z rozhlasových televizních přijímačů, takže nikdo nemusil platit ani za koncert, ani za film, ani za sbírku lyrických básní, povídek nebo jinou knihu. — Tož jak, člověče, řekl jsem si, byl bys tam šťasten? Opravdu by ti už nic nechybělo ke štěstí? — I chybělo, a zejména by ti, věř, chyběla knihovna. Mit knihu doma, počítat ji

k věcem, s nimiž ses sžil jako s nejmilejšími lidmi, být s ní sám, hledat její tajemství, bloudit v ní a z dálky tušit světlo, vrátit se a znovu se obírat krásným slovem, krásnou větou, nebo jen rytmem té věty, to je ovoce tiché družby ze čtyř nevelkých stěn, kam se ti s knihami vejde celý svět, celé věky. — Svět bez hranic, i věky bez hranic. (Josef Kopta v N. O.)

Budeme i v tomto ročníku pokračovat v uveřejňování textů k překladu. Těšíme se, že překladatelů bude stále více. Věnujte tomuto překladu část některé schůze vašeho klubu! Prosíme, abyste nám překlad zaslali do 5. března t. r. — V příštím čísle uveřejníme překlad textu 14. i s poznámkami. — Tam také zaujmeme stanovisko k mínění p. V. D. o slůvku ja.

LOKAJ INFORMOJ

Bohumín. — Inaŭguro de Esperanto-monumento: En tiu ĉi apudlima urbo inaŭguris esperantistoj el regiono Ostrava E-monumenton. En Bohumín staris jam antaŭ la milito simila monumento, kiun starigis la tiama Regiona E-Ligo. Tiun monumenton detruis ĉe sia alveno la germanaj okupaciintoj, nur la fundamento restis. Arbetaĵoj ĉirkaŭkreskis ĝin. — Post la milito ekhavis la nuna prezidanto de EK Bohumín A. Kermel ideon restarigi la monumenton kaj donis por tiu celo financajn rimedojn. La monumento estas starigita sur la malnova fundamento, en urba parko. La inaŭguron aranĝis EK Bohumín kun Regiona E-Ligo Ostrava. La programon de la aranĝo gvidis K. Janouš, Ostrava, kiu je la 10a matene malfermis la solenon kaj transdonis parolon al s-ro Vicha, reprezentanto de Loka Nacia Komitato. Post sia ĉeĥa parolado

li malkovris la monumenton. Aro de 300 homoj ekkantis la himnojn ĉeĥoslovakon kaj E-istan. Sekvis esp. parolado de Prof. Popiolek, pola e-isto el Wrocław, kiu akiris ĉies simpation per siaj koraj kaj varmaj vortoj. V. Slaný, Vitkovice, esperante salutis la gastojn kaj dankis al tiuj, kiuj helpis la restarigon. A. Kubala, Zábřeh, per ĉeĥa parolado adresita al pli vasta publiko klarigis la signifon de tiu ago kaj de la homaranaj ideo kaj servo de E. La antaŭtagmezan parton de la festo finis deklamado de poemo „Ĉe memorŝtono“ (Hanzelka, Kunčičky). Eksterurbaj partoprenantoj tagmanĝis komune en hotelo Avion. Posttagmeze okazis en la hotelo amuzfesto dum ĉeesto de 150 p. Deklamis ĝin Hlaváčková, Zábřeh, solkantis ĉeĥe s-ino Muroňová, grupo de e-istoj el Ostrava fiore deklamis la „Preĝon sub la verda standardo“ kaj kantis

la „Tagiĝon“. Hanzelka, Kunčičky, deklamis „Marinjo Magdon“, horo el societo Komenský, Zábřeh, kantis kvarvoĉe „Se Esperanto sonos“. E-pioniro s-ano Raszka, Bohumin, solene transdonis bibliotekon al la loka EK. La bibliotekon li savis antaŭ germanoj kaj zorgis pri ĝi dum la tuta milito. Lia ago estis danke aplaŭdata. S-ano Janouš rememoris la 40jaran E-laboron de s-ano Kubala. Gajajn kaj spritajn poemojn deklamis Vajdik, Ostrava, koncertis muzik-kvarteto el Zábřeh kaj oni lotumis tombolon. Ora punkto de l'programo estis kantado de bulgara tenoristo Nuni Nanev, veninta el Olomouc. — Tiutage funkciis en la hotelo informejo, kie interesigantoj povis ricevi informojn kaj fotografaĵojn de l'monumento k. s. Ofereme deĵoris J. F. Mazánek, Slezská Ostrava. Ĉiuj partoprenintoj de l'festo ricevis senpage la 4paĝan informfolion pri EAĈSR. Samideanoj Kermel kaj Trombala meritas dankon pro prizorgo de dekoracio kaj flagoj por la monumento kaj hotelo Avion. Krom esperantistoj el la regiono ĉeestis gastoj el Praha, Olomouc, Slovakio kaj Polio. Salut-leteroj kaj telegramoj venis el multaj urboj de ĈSR kaj Polujo kaj unu eĉ el Svedujo. (Janouš)

Břeclav. — Ĝenerala kunveno de E-rondeto 3. II. en Flava lernejo je 19-a horo. Konversaciaj kunvenoj regule ĉiun unuan kaj trian mardon je la 19-a horo en Flava lernejo. Sekretario R. Trojna, Břeclav, Nám. P. Bezruč 20.


Brno. — Programo de la kunvenoj en januaro—aprilo 1948. 6. I. Jam temp' estas (J. Vondroušek). 13. I. Film-prezentado. Projekcio de filmoj (J. Pávek). 20. I. Palestino—Egipto, 120 diapozitivaj (F. Baďura). 27. I. El miaj esperantistaj rememoroj. Rakontado el ĉiuj anguloj de l'mondo (J. Friedrich). 3. II. Literatura vespero. 10. II. Amika vespero. Kanzonoj, recitado. 17. II. Ĝenerala kunveno. 24. II. Vespero de kantoj kaj arioj (Nuni Nanev, tenoristo de l'opero en Sofia. Ĉe piano Petra Naneva. Piano-soloj: komponisto Vilibald Scheiber). 2. III. Solena akademio al TGM. 9. III. Al internacia tago de l'virinoj (M. Vondroušková). 16. III. Rakontoj de K. Čapek (J. Kořínek). 23. III. Historietoj el antikva Brno (J. Ambrož). 30. III. Kabaredo. 6. IV. La plej bela sporto. Vojaĝado estas spico de l'vivo (H. Kořínková). 13. IV. Ĉe fonto de bona humoro (R. Nečas). 20. IV. Rezervita por grupo Tuřany (J. Hoffner). 27. IV. Teatra vespero. Monologo, unuaktaĵo, skeĉo. — Krom la programo lasthoraj informoj pri la movado, konversacio, tradukado, societaj ludoj. Biblioteko, gazetaro disponeblaj. La kunvenoj okazas ĉiun mardon je la 19,30 horo en hotelo Passage, Lidická 23. Ĉiu kunveno estas atentinda entrepreno, vizitata de 50—60 gesamideanoj. Speciale sukcesis Zamenhof-vespero kun koncerta kantistino Zorka Mazlová, kantinta famajn ariojn en ĉeĥa lingvo kaj en E., ludis violone F. Mašek la faman Polonezon de Wienawski. Menciinda estas ankaŭ la gaja Nikolao-vespero kaj Bulgara vespero.

Dolní Suchá. — Neŭtrala Esperantista Asocio aranĝis 20. XI. dancludon „Vinberrikolto“, bone sukcesintan. La 16. XI. komenciĝis 3-monata kurso kun 6 p. en gastejo J. Balon, instruas Emil Klímsza. La kurso estis propagandita en 4 kinoteatroj: Dolní, Prostřední, Horní Suchá kaj Šumberg. N. E. A. posedas ankaŭ informan keston propagandan.

Hradec Králové. — Septembre 27 prelegoj de la kluba sekretario J. Vitek en 16 lokoj de Danujo. EK sendis amikan donacon al EK Malmö, Svedio. Ĝi estas gramofondiskoj kun la muzikpoemo de B. Smetana „Mia patrujo“ (Má vlast). Amika kunlaboro inter ambaŭ kluboj daŭras de post 1945. La donaco estis entuziasme akceptita, la konfirma letero kaj raporto en la klubgazeto de EK Malmö pruvas tion. Ankaŭ EK Hradec Králové eldonas klubgazeton bone redaktitan, bele presitan sur luksa papero. Oktobre komencis du kursoj: publika kun 33 p., fervojista kun 17 p. Nova granda informa kesto estas instalita proksime de la stacidomo. Novembre publike prelegis en la urba muzeo J. Vitek pri sia vojaĝo en Skandinavio. La urbo eldonis urboplanon kun E-teksto, redaktita de prof. Miloš Lukáš. Membroj de EK L. Rejthárková, Z. Hršel kaj S. Váňa sukcese trapasis ligrvan ekzamenon antaŭ la Ekzamenkomisiono de EAĈSR. — 5. XII. Nikolaa vespero, variigita per prelego de V. Blažek, Olomouc, pri la E-kongreso en Bern. — 12. XII. Vespero de Dro Zamenhof. — 19. XII. Kristnaska vespero kun sonfilmoj pri Usono. — La kursoj finiĝis, 36 frekventintoj ricevis ateston.

Jablonec n. N. — En oktobro fondita loka grupo de EAĈSR kun 20 membroj. Prez. Jos. Roubínek, V. luziĉ nro 22, sekretario Rony Janečka, Skřivánčí 66, kasistino Ludmila Erbenová, Bažantí 4, propagando Miloslav Jíra, V. niváč 19, arkivisto Miroslav Jakeš, Rýnovická 66. Kunveno ĉiulunde je 19.30 horo en hotelo „Na Baště“. Koresp.: Klubo Esperantista, Jablonec n. N. aŭ al Roubínek aŭ Janečka. En Jablonec, urbo mondkonata pro sia biŭterio, atendas nian novan grupon gravaj taskoj.

Josefov. — Vespero aranĝita 20. XII. de nove fondita klubo; programon aranĝis plejparte la plej junaj membroj, lernantoj, 20 membroj de EK Hradec Králové partoprenis. Al la finintoj de la du kursoj (junulara, 19 p., instr. J. Páv, publika, 26 p., instr. Stan. Váňa el Hradec Král.) estis disdonitaj atestoj.



Membraro en Josefov.

Karlovy Vary. — La unua regula ĝenerala kunveno de la esperantista klubo okazis la 22-an de januaro 1948 en la propra klubejo. Krom la kutima programo havis koncizan, sed trafan paroladon pri esperantista ideo s-ano Fr. Mašek. Per ĉies voĉoj estis elektitaj jenaj komitatanoj: Rudolf Emmer, prezidanto; František Milek, vicprezidanto; Jaroslav Černý, sekretario; Petr Tichota, kasisto; Antonie Sahánková kaj Jiří Čechner, revizoroj; František Mašek, bibliotekisto kaj propagando; Jaroslav Tichota, klubej-zorganto; Antonín Pilař, anstataŭanto. — Per sia kara vizito ĝojigis la partoprenantojn s-anoj Dr. Fr. Vaněk, kuracisto el Nová Role, Al. David, staciestro el Chodov, J. Lička, terkulturisto el Lesov, kiuj fariĝis membroj de nia klubo, kaj Frant. Patera el Cheb.

Kladno. — Kurso komencis en novembro kun 9 gejunuloj, kiuj ĉiuj restis ĝis fino kaj post 5 duhoraj lecionoj ili ĉiuj kapablas rakonti tralegitajn tekstojn. Kurson gvidis s-o Jaroslav Hanuš. Ili ĉiuj ĝojas, ke ili depost la 10-a de januaro povas partopreni en konversaciaj kunvenoj de la refondata loka klubo. Dua kurso, gvidita de s-ino B. Vlčková, komencis ankaŭ en novembro en Vrapice; partoprenis 9 geskoltoj.

Lázně Bohdaneč. — Laŭ instigo de A. Grossmannová-Vamberová aranĝis 28. XI. loka Kleriga Konsilantaro paroladon de Vitek pri Svedio kun lumbildoj. Partoprenis 70 p. Pri aktualaĵoj esp. informas reklamtabulo.

Mistřín u Kyjova. — Interesantojn kolektas kaj fondon de loka grupo preparas s-o Toman Vít.

Modřany. — Tie viglas Alois Zedník, kiu depost la 2. I. gvidas kurson komencitan post la bona preparo. Dum novembro kaj decembro estis projekciata en loka kinejo propaganda diapozitivo, al la entreprenaj konsilantaroj, politikaj partioj, societoj ktp. en la loko estis dissendita varba cirkulero lerte verkita. Estas preparata fondo de loka EAĈSR-grupo.

Nýrsko. — Nacia optika entrepreno Okula aranĝis dum novembro-decembro E-kurson por siaj laboristoj. Gvidis Rudolf Kolář kun 12 p., kiuj restis ĝis fino.

Olomouc. — 4. X. EK Olomouc solenis la 60jaran jubileon de E. per koncerto de membro de l'opero en Sofia s-ano Nuni Nanev. Ĉi tiu bulgara tenoristo aranĝas nun en nia respubliko kantkoncertojn sub protekto de la bulgara ministro kaj ambasadoro en nia ŝtato s-ro Štefan

Simov. Estante esperantisto li decidis propagandi nian lingvon ankaŭ per siaj artistaj entreprenoj. Lia solena koncerto en nia urbo estis lia unua debuto tiuspeca. Voĉo de la preso pruvas, ke li atingis la intencitan celon, montrinte al vasta publiko, grandparte neesperantista, ke E. taŭgas por kanto same bone kiel la belsona lingvo itala. — Dua grava tago por la esperantistaro en Olomouc estis la 12. X., kiam oni solene malfermis novan tramlinion en antaŭurbo Hodolany. EK estis inter la unuaj korporacioj, kiuj disponigis volontulajn laborgrupojn por helpi la konstruadon. Tial delegitaro ankaŭ de EK ĉeestis la solenan malfermon de ĉi tiu verko, la unua plenumita en la kadro de la dujara plano de nia urbo. S-anoj grandnombre venis kun verda standardo al tiuokaza surstrata manifestacio, altirante la atenton de l'publiko al E.

Podmokly. — Festkunveno de la nove fondita grupo „Ĉiam antaŭen“ 30. XI. kun e-a kaj ĉeĥa amuzprogramo, brile prizorgita de anoj de EK Ústí nad Labem, kiuj prenis sur sin la taskon simile subtenadi la laboron en la tuta limregiono. Dank' al tiu ĉi bonvola helpo oni povis, la unuan fojon post la milito, proponi al la publiko de Podmokly kaj ĉirkaŭaĵo pli intiman interkonatiĝon kun E. Malgraŭ bona preparo kaj propagando per afiŝoj kaj gazetoj, ne renkontiĝis la entrepreno kun la meritita atento. Venis nek kulturfakuloj nek oficialuloj. Ĉeestis 35 p., inter ili s-anoj el Benešov nad Ploučnicí, Česká Kamenice, Děčín kaj Střekov. Ĉiu bonege amuzis sin kaj montris firman fidon kaj entuziasmon por plua laboro. „Ĉiam antaŭen“ dankas publike precipe al s-ano Mothejzík pro la bona aranĝo de l'programo. Estas dezirinde, ke ĉiuj grupoj laboru kun tia kompreno kaj pacienco, kiel la s-anoj de Ústí nad Labem. (Růžička)

Praha. — EK kunvenas regule ĉiun merkredon je la 20a horo en kafejo Louvre, Praha II, Národní 20. La programoj de la kunvenoj estas por ĉiu monato en ĉefaj punktoj antaŭe fiksitaj kaj havas ĝenerale altan nivelon. — En oktobro oni fondis „Junularan rondeton“, en kiu kolektiĝas junaj anoj de la Klubo kaj disvolvas ĝojigan agadon, per kiu la kluba vivo ricevis novan refreŝigon. Tio estas grava afero, ĉar estas nepre necese larĝe plijuniĝi niajn vicojn. La junularo ja signifas la progreson kaj sukcesan estontecon de nia movado. Estro de la „Junularo“ estas s-o Josef Forman, tre vikle kunlaboras ges-oj Miloš kaj Eva Nývlt, Vlasta Zvědělíková, Alice Fryšová, Stanislava Boucká, Josef Jordán k. a. — Kursoj de Esperanto okazas daŭre en Laborlernejo de ŬRO. — Konversacia kurso antaŭ ĉiu kunveno de 19—20-a horo daŭras senĉese. Instruas s-oj Ant. Slanina kaj Pavel Šlechta. — Programoj de kunvenoj: 23. IV. Jar. Mařík: Raporto pri s-ino Marika Dragonas, Saloniki, kiu estis kondamnita al dumviva karcerero. Fr. Sviták komentas sian artikolon en gazeto „Práce“ koncerne anstataŭon de germana lingvo per Esperanto. — 30. IV. Jar. Šustr raportas pri la propono de nova internacia lingvo „Komun“ de s-ro Musil el Praha; Dr. T. Pumpr montras la lernolibron kaj komparas ĝin kritike kun Esperanto, montrante kelkajn ekzemplojn. Dr. A. Pitlík parolas pri invito de Universala kongreso al Praha por jaro 1950. — 7. V. J. Šustr: Memparolo je la 2a jubileo de nia maja revolucio 1945. K. Čičanov: „Bulgara ribelmovado dum du mondmilitoj kontraŭ germanamika politiko de bulg. regantoj“. 14. V. A. Slanina: Filmvespero: Invado en Francio 1944. Groteskoj kun Ch. Chaplin k H. Lloyd. — 21. V. Jar. Mařík: Prelego pri elparolado de Esperanto kaj ĉeĥoslovaka influo pere de radioelsendoj. V. Echnér: Atentigo al Jug. E.-kongreso en Varaždin. — 28. V. Solena vespero por honorigo de 63-a naskiĝtago de prezidento Dr. E. Beneš. Programo: T. Balda: Prelego „La vivo de prez. Dr. Edv. Beneš“. VI. Zvědělíková: 2 kantoj. El la vivo de s-ino Hana Benešová (legis VI. Boháčková). „Historia batalado por la libereco de nia nacio“, recitativo, prezentis T. Balda, A. Slanina, M. Baldová, Š. Šimandlová. Gramofonmuzikon prizorgis F. Landsman, aranĝis T. Balda. Ĉeestis 60 personoj. — 4. VI. S-o Kurz el Beograd: „Praktikaj servoj de Esperanto“. S-o Zumstein (Svisujo): Impresoj en ĈSR kaj pri esp. movado kaj estonta kongreso en Bern. J. Mařík: Esperanto en internacia kongreso de ĵurnalistoj en Praha. — 11. VI. Fr. Sviták: „Rememoro je Lidice“. E. Kovary, USA, ofic. el Berlino: Salutparolo kaj pri Esperanto en Germanujo. A. Slanina: Informoj pri radioelsendo de Praha kaj pri Somera lernejo en

Doksy. — 18. VI. Leteroj el eksterlando (Sovetio, Francio, Svisujo); legis kaj komentis Svačinová, Sviták, Slanina. T. Balda: Poemo de F. Zamenhof „Stelo sur la tero“. J. Šustr: EK-Praha havas telefon-numeron kaj adreson en nova telefon-registro. — 25. VI. J. Šustr: Reg. kunveno en Ústí n. L. — invito, donaco al Klimkovic, nova reklamo ĉe Wilson-stacidomo. T. Balda: Deklamado de „Infana balado“ de J. Neruda kaj „Kuniru, gefratoj“, poemo de sveda verkisto. — 2. VII. Amuza vespero kun varia programo kaj gramofonmuziko: Spritajoj en Esperanto (Balda kaj Sviták). — „Viva gazeto“ (korespondu eksterlanden nur esperante!), V. Echnér. Interesindaĵoj el esperantista vivo (J. Čížek, J. Valeš, A. Slanina). — 9. VII. J. Šustr: Invitoj al reg. kunveno en Plzeň kaj kongreso de slovakaj esperantistoj en Turč. Sv. Martin. S-o Petersson (Svedio): Salutparolo en nomo de svedaj laboristaj esperantistoj. — 16. VII. S-ino Anna Alamo: Prelego pri travivaĵoj kaj impresoj en ĈSR. S-o Vitek: Aldonoj al prelego de s-ino Alamo. A. Malik: Dankesprimoj al s-ino Alamo pro ŝia laboro en ĈSR en la nomo de ĉeĥoslovakaj esperantistoj. — 23. VII. J. Šustr: Atentigo pri afiŝoj, eldonitaj okaze de 60-jara jubileo de Esperanto, kiuj estis ĵus afiŝitaj en Praha dum la Mondfestivalo de junularo. F-ino E. Combiér, Lyon: Salutparolo kaj rakonto pri impresoj en Praha. A. Malik—V. Král: Raporto pri preparoj de vojaĝo al kongreso en Bern. — 30. VII. Jan Valeš: Raporto pri la malfermo de Somera Esperanto-lernejo en Doksy kaj pri ekskursoj al Liberec kaj Ještěd. S-ino Bois (Francio): Salutparolado. — 6. VIII. T. Balda: Raporto pri tutslovaka kongreso de Esperanto, kiu okazis la 12.—13. VII. en Turč. Sv. Martin. Salutparoloj de eksterlandaj gastoj (ĉeestis 15). S-o Krolenbaum, Londono: Prelego pri 32-a Universala kongreso de Esperanto en Bern. Unu el plej ĝojigaj kunvenoj de tiu ĉi jaro; medio kiel en internacia kongreso. — 13. VIII. S-o Dratwer, Varsovio: Salutparolo en nomo de polaj esperantistoj. Krolenbaum: Prelego pri propagando de la paco per Esperanto inter ĉiuj landoj. A. Slanina: Raporto pri Somera Esperanto-lernejo en Doksy. S-o Ditrich (Jugoslavio): Pri ideo de Esperanto super la politiko. — 20. VIII. Dr. Baur, Bern: Prelego pri Svislando, akompanita kun 3 mallarĝaj filmoj. Tre interesa kaj bela vespero, kiu okazis en granda salono de kafejo Louvre. Ĉeestis ĉ. 100 p. (9 eksterlandanoj). — 27. VIII. A. Slanina: Raporto pri ŬRO-kursoj kaj radio-kultura sekcio. F-ino Gerbranda (Nederlandoj): Impresoj en ĈSR. J. Vitek: Vivo kaj progreso de EK-Hradec Král. kaj pri ŝia proponita prelegvojaĝo al Skandinavio. — 3. IX. V. Echnér: Prelego pri 32-a Universala kongreso en Bern. J. Hebký: Leteroj el eksterlando. T. Balda: Artikolo el sveda gazeto. — 10. IX. K. Šolc: Rakonto pri „Verda Doksy“. A. Slanina: Gazeto „Verda voĉo de Doksy“ kaj pri novaj kursoj. E. Rašková: Salutparolo en silezia dialekto okaze de transpreno de libroj de EK por Klimkovic. Debato pri skribitaj prelegoj, esp. elparolado, interŝanĝo de prelegoj inter kluboj (partoprenis Šolc, Heiken, Šustr, Slanina). — 17. IX. A. Slanina: Provelciono de oratora kurso. Fr. Bárta (Žilina): Paroladeto pri libertempo en Karlovy Vary. — 24. IX. T. Balda: T. G. Masaryk - 10-jara datreveno de lia morto. J. Šustr: Rememoro je 80-a naskiĝtago de P. Bezruč. Deklamado de trad. poemoj: Maryčka Magdonova (J. Kafka), Ruĝa floro (M. Baldová), A. Bárchochová: Prezidanto Šustr estas ĵus hodiaŭ 27 jaroj ano de EK-Praha. — 1. X. A. Slanina, M. Nývlt, J. Forman: Fondigo de „Junulara rondeto“ ĉe EK-Praha. „El esperantista vivo“: Pilgrimo de V. I. Lenin en ĉielon (V. Lorenc). Kantado en Esperanto (M. Baldová). Vizito de foiro en Praha (F. Landsman). Ideo de internacia lingvo (J. Rajm). Rakonto el vivo en suda Bulgario (K. Čičanov). — 8. X. J. Šustr: Prelego pri Dr. Emil Holub, fama ĉeĥa esploristo de Afriko, okaze de 100-jara naskiĝjubileo. A. Fryšová: Raporto pri inaŭguro de Esperanto-memorŝtono en N. Bohumín, kiun ŝi partoprenis la 5-an de oktobro. A. Slanina: Raporto pri malfermo de entreprena E.kurso en ŬSP. — 15. X. T. Balda: Prelego pri antikva Praha kun lumbildoj. J. Valeš: Atentigo pri Esperanto en filmo „Diktatoro“ (USA) kun Ch. Chaplin. — 22. X. R. Hromada: Spertoj de radioparoladisto. „Junularo venas“, M. Nývlt: Enkonduka parolado. Sceno: Disputo — ĉu muziko klasika aŭ moderna? (J. Forman, A. Fryšová, J. Jordán). — 29. X. Solena vespero por honorigo de 28. oktobro.

Programo: Ĉeĥoslovaka himno, malfermo (prez. J. Šustr), prelego „28-a oktobro“ (T. Balda), „Sonorilo“, poemo de O. Scheinpflugová (E. Nývltová), 2 kantoj de B. Smetana (VI. Zvědičková), „Printempo venos“, poemo de J. Sládek (V. Lorenc), filmo pri T. G. Masaryk (A. Slanina), esperantista himno. Aranĝis T. Balda. - Prof. Dr. Jokl, Tábora: Raporto pri Esperanto en kongreso de ĉeĥoslovakaĵ-geografo (lernolibro de prof. Urban). — (Sv)

Praha-Libeň. — Ĝardeno, fako de EAĈSR, organizis kurson en la nomo de la Supera popolkleriga lernejo en Libeň. L. Kynčl instruas 25 p.

Praha-Ruzyň. — En la tiea Pomologia lernejo M. Bralavec, membro de „Ĝardeno“, instruas Esperanton.

Tanvald. — La eta grupo baldaŭ pligrandiĝos. Kelkaj novaj anoj, diligente lernintaj de post oktobro, komencas aktive partopreni nian kluban vivon. Nova kesteto pendas ĉe la enirejo de la hotel Central, kie okazas ĉiunmerkredaj klubaj kunvenoj. Dum vintra sezono skiaj ekskursoj kun esp. konversacio, aranĝitaj komune kun la Klubo de ĉs. turistoj. Vizitu la grupon sabate kaj dimanĉe, sed skribu antaŭe al Esperanto-klubo, sekr. Z. Řezáč, Tanvald 456, p. Tanvald-Sumburk n. D.

Teplíce-Šanov. — Kurson por 13 bankoficistoj gvidas Otto Skleněka. Fondiĝas loka klubo, unua kunveno 14. I.

DIVERSAJ SCIIGOJ

Esperanto en la lernejoj. Laŭ privata sed fida informo la nederlanda ministro por instruado intencas sciigi al la parlamento sian planon pri enkonduko de Esperanto kiel nedevigan fakon en ĉiujn bazajn lernejojn en Nederlando. Bone sciante, ke nur per la lernejo Esperanto atingos sian celon, ni kore gratulas al niaj nederlandaj samideanoj al tiu ĉi ege grava sukceso. Ni esperu, ke la s-ro ministro povos efektiviĝi sian planon, ĉar la ekzemplo de la simpatia Nederlando forte subtenus la analogian laboron de esperantistoj en aliaj landoj. (Th. Kilian)

Esperantista sekcio de Ĉeĥoslovaka Skolto eldonis vige verkitan cirkuleron, alvokantan siajn membrojn al aktiveco. Ni ĉerpas el ĝi, ke la centro permesis al la skoltoj per sia letero de la 21-a de majo porti esperantan insignon super dekstra brustpoŝo dum vojaĝo en eksterlandon kaj dum enlandaj aranĝoj de internacia karaktero.

Esperantista klubo en Praha decidis en sia komitata kunveno de 22. XII. 1947 pagi al EAĈSR por ĉiu sia membro po 60 Kčs anstataŭ la postulataj 55 Kčs, por tiel subteni la laboron de la Asocio. Vivu nia plej granda klubo en la respubliko kaj vivu la sekvantoj!

Abelbredistoj, skribu tuj al P. Amye, esp. korespondanto de la Société Française d'apiculture (Franca Asocio de Abelbredado), 28, rue Serpente, Paris 6-e. Estas intencata interesa kunlaboro, ĉiu korespondanto ricevos laŭdezure bultenon de la supra Asocio.

Frank (Ferry) Tauchmann el Brno, bankoficisto, proksimume 50-jara, estas serĉata de sia filo en Aŭstralio. Ĉiun informon direktu al EAĈSR.

Bulgara esperantisto, deziranta studi en Praha, serĉas ĉeĥoslovakian ŝtatanon, kiu estas preta subskribi — formalan — garantian pri lia vivteno en nia lando. Detalojn donas EAĈSR.

Oficistoj en bankoj kaj moninstitutoj! Ni ripetas nian alvokon: Anoncu al ni vian adreson kaj nomon de la instituto, en kiu vi laboras. Nenion plu kaj ne postulu de ni korespondadon en tiu ĉi afero.

Interŝanĝo de poŝtmarkoj kun eksterlando estas nun pli facila. Oni povas nun sen speciala permeso sendi kaj ricevi poŝtmarkojn en valoro de 500 Kčs kaj pezo de 20 gramoj. Valoron de la poŝtmarkoj notu sur la koverto. Sendaĵoj de pli granda valoro aŭ pezo estas submetitaj al la antaŭaj reguloj pri transportkontrolado de poŝtmarkoj. Ne estas permesite sendi neuzitajn validajn poŝtmarkojn ĉeĥoslovakajn.

Novaj poŝtaj tarifoj. Ni atentigas pri la ĉefaj ŝanĝoj, kiuj validas de post la 1. I. 1948: Letero enlanda 3 Kčs, poŝtkarto enlanda 1.50 Kčs, letero eksterlanda 5 Kčs, poŝtkarto eksterlanda 3 Kčs. Ŝanĝitaj estis ankaŭ la tarifoj por presaĵoj ktp. Demandu ĉe via poŝtoŭficejo antaŭe ekspedi!

Třebíč. — La 16-an de decembro, en la jubilea jaro de Esperanto 1947, fondiĝis en Třebíč loka grupo de Esperanto-Asocio en ĈSR. La fandan kunvenon partoprenis 32 gesamideanoj de nia urbo. Post nelonga parolado, fare de la loka delegito de UEA, pri la 60-jara ekzistado de Esperanto, pri la demokratia strukturo de la Esperanto-movado kaj pri ĝia kreinto Dro L. L. Zamenhof, kies 88-an datrevenon de la naskiĝotago la tutmonda Esperantistaro festis la antaŭan tagon, la kunveno elektis provizoran komitaton, prezentotan al la unua ĝenerala kunveno de la ĵus fondita loka grupo. Inter la fondintoj troviĝas eminentuloj de la publika vivo de la urbo, nome la urbestro, la estro de la Distrikta politika administracio, docento ĉe universitato kaj ĉefkuracisto de la loka malsanulejo, distrikta inspektoro de publikaj bibliotekoj, fabrikanto, direktoro de burĝa lernejo k. a. Ni do povas prave esperi, ke la loka grupo en Třebíč honeste plenumos sian taskon en komuna laboro por la fina venko de Esperanto. (Th. Kilian)

Valaŝké Meziříčí. — Distrikta Kleriga Konsilantaro laŭ sia promeso okaze de la Alamo-parolado malfermis 18. XI. kurson. Inaŭguris ĝin la distrikta lernejspektoro J. Váňa per entuziasma laŭdo de E. (Li ne estas e-istolo!); 22 komencantojn instruas ĉiunarde vespere R. Kvita. Oni planas fondi EK post finiĝo de la kurso.

33-a Universala Kongreso de Esperanto en Malmö informos en monatoj januaro—julio per radio sur ondoj 19.80 m kaj 27.83 m la unuan dimanĉon ĉiumonate inter la 15.00 kaj 15.15 h. MET pri la kongreso. Aŭskultu kaj informu pri aŭskultu la LKK Malmö.

Radiostacio Sofia disaŭdigas en Esperanto ĉiun vendredon je 19.50 h. MET sur ondo de 32.09 m. La stacio (adreso: Radio-Sofio — Esperanto — Sofia, Bulgario) petas, ke la aŭskultintoj skribu pri siaj impresoj kaj donu siajn proponojn.

Kongresanoj en Malmö! Pasigu kelkan tempon inter liberaj homoj sur unu de niaj naturbelaj somerkampoj en Svedio. Bonvolu skribi al NORDA SUNSPORTO, Götgatan 124, Stockholm.

Kiel ĉesi la fumadon. Sekve de mia anonco en „Esperantista“ mi ricevis multajn leterojn, kiujn mi tuj ne povis respondi, ĉar - unue - mi estis ege terkulture okupita, kaj - due - mi dum mia libertempo estis devigita labori ĉe novkonstruado de mia loĝdomo, kiu estis dum german-rusa batalo en aprilo 1945 forbruligita kun preskaŭ tuta mia havaĵo. — Do, ni alpaŝu al mia propre-eltrovita metodo, kiel ĉesi fumadon: Matene, tuj post ellitiĝo, antaŭ ol surmeti vestaĵojn kaj antaŭ lavado, elprenu el monujo moneron (ekzemple 10 Kčs), kiun oni kutime elspezadas por ĉiutaga fumado, kaj enmetu ĝin en ŝparmonujon. La ŝparmonujo povas esti simpla karton-paperskatoleto kun surskribo: „For fumadon!“ — Post unu aŭ duonata ripetado elprenu enmetitan sumon el la skatoleto kaj sendu ĝin al EAĈSR en Praha, kiel subteno kun la rimarko, ke tiun ĉi monon vi ŝparis pro nefumado. Se vi volas, vi povas sendi al mi poŝtkarton pri tiu ĉi afero, por ke mi povu montri ĝin al niaj gesamideanoj. Se vi eble ne estos kapabla tute ĉesi fumadon, do provu almenaŭ limigi ĝin, ĉar ĉiuj samideanoj bone scias, ke nia centra oficejo en Praha havas nek ejon por deĵori, nek oficistojn por plenumi niajn dezirojn. — Nun, kara leganto, vi staras antaŭ grava elekto... Aŭ vi pli amos fumadon aŭ nian movadon. Mi kredas, ke vi elektos la duan! — Baldaŭan sukceson deziras via s-ano Svačina Fran, delegito de Universala Esp. Asocio en Lanzhot 663. — Mi korespondas pri temoj: 1. Pri kaprin-bredo laŭ plej moderna metodo. 2. Pri tuta homa vivo, de naskiĝo ĝis renaskiĝo. 3. Pri metodo kiel ĉesi fumadon. — Je revido en Praha dum kongreso!

Mendu tuj
POŜAN KALENDARION 1948
ĉe Librovendejo de EAĈSR por 32.40 Kčs afrankite.
Sukcesinta eldonaĵo de niaj amikoj en Hradec Král.

*Sinceran bondeziron al la jaro 1948
kaj dankon por la alvenintaj gratuloj!*

REDAKCIO DE „ESPERANTISTA“
Esperanto-Asocio en ĈSR kaj ĝia Librovendejo

INFORMOJ DE NIA LIBROVENDEJO pri nove venintaj libroj (recenzo sekvos).

Jan Valaŝtan-Dolinský, **Okienko de sveta**. Uĉebnica mezinárodního jazyka Esperanto, 64 pĝ 15×21 cm. Eld. Slovaka Esperanto-instituto, Turč. Sv. Martin. Kĉs 30.—. Ed. V. Tvarožek, **Esperanto v 14 úlohách**. Eld. Slovaka Esperanto-Societo, Bratislava. 28 pĝ 21×30 cm. Prezo Kĉs 15.—.

Tri eldonajoj de Svisa E-Societo:

Du amoncentaj noveloj, Imenlaĝo de Th. Storm kaj Maruška de M. Escherich. 42 pĝ 16×23 cm. Kĉs 26.80.

J. C. Heer, **Ĉe la Sanktaj akvoj**, Unua parto. 82 paĝoj 16×23 cm. Kĉs 39.60.

Pensoj de Zamenhof. Originalaj sentencoj de Zamenhof, tradukitaj en francan, anglan, germanan kaj italan lingvojn. 32 pĝ 13×20 cm. Kĉs 12.80.

Du novaj kajeroj de la portugala „Enkonduko en la sciencoj“. Prezo 7 Kĉs por 1 kajero aŭ 34 Kĉs por kompleta serio de 6 kajeroj:

Ag. de Silva, **La budhismo**. 24 pĝ 13×17 cm.

Ag. de Silva, **La prahistoria arto**. 24 pĝ 13×17 cm.

Eldonejo de Sveda Laborista Esperanto:

Sveda laborista movado. 92 pĝ 13×18 cm. Por 2 respondoponaj ĉe Svenska Esperanto-byran, Barnhusgatan 8, n. b. ög., Stockholm.

Ni serĉas: **Literatura Mondo**. Kajero 1/2 de 1947 kaj pagas por nedifektita ekzemplero 50 Kĉs.

Prezoŝanĝoj: Vivo de Zola Kĉs 30.—.
Ĉeĥoslovaka Antologio en spec. bela bindo Kĉs 285.—.

Plena Vortaro. Ni ĉiam akceptas mendojn, sed devas peti pri pacienco. La eldonejo ekspedas tre malrapide, novan sendaĵon ni atendas nun depost preskaŭ 2 monatoj.

Eksterlandaj eldonajoj. Ni povas akcepti mendojn por ili nur en tre limigita mezuro kaj sole escepte. Ni donos novan informon, kiam ŝanĝiĝos la situacio.

Stacidomaj tabuloj. Niaj membroj en pluraj lokoj atentigas denove tiun valoran propagandmanieron, kiun prezentas stacidomaj tabuloj, t. e. tabuloj fiksitaj en la stacidomo, atentigantaj pri nia lingvo kaj plej proksima loko, kie oni povas ricevi pri ĝi informon. Grava estas la tabulo ankaŭ laŭ turista vidpunkto, ĉar laŭ ĝi vojaĝanta esperantisto povas trovi samideanan helpon aŭ konsilon. Konsiderante ĝian signifon, donis la ministerio de fervojoj per sia dekreto nro 46.884/33—III/3 de 29. X. 1923 permeson senpage pendigi tian tabulon en ĉiu ĉeĥoslovaka stacidomo. Estas postulata nur t. n. rekona pago formala de kelkaj kronoj (antaŭ la milito 5 Kč) jare. — Uzu tiun eblecon niaj grupoj, perantoj, UEA-delegitoj kaj ĉiuj aktivaj membroj kaj zorgu, ke la vojaĝanta publiko trovu ĉie tra la respubliko laŭte vokantan Verdán Stelón en la stacidomoj. — La Asocio havas ankoraŭ malgrandan provizon de belaj tabuloj ladaj, farintaj por tiu ĉi celo. Aldonota estas sole la adreso, kiun faros loka pentristo aŭ lerta samideano mem. Ni mendas ilin afrankite po Kĉs 100.— tuj post ricevo de la mendo. — Ie jam pendas tiaj tabuloj kaj fervoja administracio postulas por ili normalan pagon, kiu estas alta. En tiuj okazoj bonvolu atentigi vian staciestron pri la supre citita ministeria dekreto kaj postulu malaltigon.

La librovendejo aperigis presitan liston de aĉeteblaj verkoj. Interesatoj, mendu ĝin!

Ne forgesu! Hradec Králové aranĝas la 20. III, sian tradicion „JOZEFAN“ vesperon. Rezervu tiun tagon por viziti duan plej grandan ĉeĥoslovakian klubon. Trankvilo senkostas, sed anoncu vin antaŭe! Dimanĉe la 21. III. labor-konferenco. — E. K. Hradec Králové, Zamenhofova 1010.

III. letní škola esperantia V DOKSECH U MACHOVA JEZERA 10.—24. července 1948.

Prozatímní program:

1. Kursy (dopoledne):

a) Základní, pokračovací, konverzační.

b) Seminář (pro znalé esperanta, jeho učitele a činovníky): Teorie mezinárodního jazyka, gramatické problémy esperanta, literatura, organizace a dějiny esperanta. Csehova metoda. Odborné přednášky předních odborníků literárních, propagačních a j.

2. Zábavné podniky (odpoledne, večer a v neděli):

Divadlo, koncert, filmový večer, kabaret, karneval, společný zpěv, koupání v jezeře, tanec, výlety a j.

Program »Školy« bude proti loňsku — jak v části poučné tak i zábavné — značně rozšířen. — Účastníci obdrží po písemné zkoušce vysvědčení o účasti a prospěchu. — Vyučovatí budou odborníci (vyjednávají se též o učitele ze zahraničí). — Příprava ke zkoušce před zkušební komisí Svazu. — »Předkongres« XXXIII. Svět. esperantského kongresu r. 1948 v Malmö. — Esperantisté, nedějte si ujiti příležitost prožiti příjemnou a poměrně levnou dovolenou v esperantském letovisku u českého »moře«, obklopeného množstvím přírodních krás! Doporučte účast svým dětem, příbuzným a známým, nemůžete-li se sami účastnit! Pozvete neesperantisty, kteří se chtějí esperantu naučiti!

(Další informace v příštích číslech.)

Komitét »Letní školy esperanta«.

RADIO

La programo de la esperantaj disaŭdigoj de la radiostacio Hradec Králové dum la monatoj aŭgusto—decembro 1947. Ondo 231 metroj, ĉiumarde je la 21,45—22-a horo, krom la unua mardo de ĉiu monato. Programkomisiono: Markéta Otčenášková, Stanislav Váňa, Miroslav Hromas. Adreso: Radioesperanto, Hradec Králové, Zamenhofova 1010. — 28. 8. Tia estas la vivo („Sklavidoj“). — 4. 9. Postlibertempa meditado (Jiří Otčenášek). — 11. 9. Slovaka kaj internacia kongreso nunjaraj (Jos. Vitek). — 17. 9. Novaĵoj el la movado (M. Otčenášková, Stan. Váňa). — 24. 9. Pri mallongonda disaŭdigo (Jiří Otčenášek). — 30. 9. Raportoj por P. T. T. (Mir. Hromas). — 14. 10. Vitek raportas el Danujo (M. Otčenášková). — 21. 10. Enlanda movado (M. Otčenášková, Stan. Váňa). — 28. 10. Ĉeĥoslovakio kaj ĝia porlibereca batalo (Frant. Pytloun). — 11. 11. Ĉina horeto (M. Otčenášková, M. Patzaková, S. Váňa). — 18. 11. Nunjara skandinava prelegado (Jos. Vitek). — 25. 11. Letero el Belga Kongro (B. M. Vosáhlo, Leopoldville). — 9. 12. Rememoroj flugas - 15. XII. (Jos. Vitek). — 16. 12. Regiona jara laboro (Frant. Pytloun). — 23. 12. Kristnasko - festotagoj de l'paco (Václav Knoulich, M. Štěpánková). — 30. 12. Unu jaro de tutmonda movado (M. Patzaková, L. Rejthárková, M. Štěpánková).

Svačina Fran, Lanžhot 663

korespondas kun tuta mondo pri jeno:

1. Bredado de senkornaj kaprinoj laŭ plej moderna metodo. — 2. Pri tuta homa vivo de naskiĝo ĝis renaskiĝo, ne nur ĝis morto. — 3. Kiel ĉesi fumadon.